

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro . P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1978 2

KULTURAJ KAJEROJ

1978 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la Mondo A. Frangeul

Anĵuo

Novaj energio-fontoj

Heraklo

La dervišo kaj la Morto M. Selimovic
trad. R. Imbert

Peĉjo G. de Maupassant
trad. R. Dupuis

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Preskaŭ kvindek geknaboj malpli ol 15-jaraj samtempe en sama loko dum unu semajno, tio relative ofte okazas. Tia grupo, konsistanta el Francoj, kiuj ne scipovas la italan lingvon, kaj de Italoj, kiuj tute ne scipovas la francan lingvon, tio kelkafoje okazas... en tiel nomitaj « ĝemeliĝoj ». Simila grupo, kiu ludas, kursas, ekskursas en bona interkompreno, nur en ege malmultaj lokoj vi tion renkontas. Dum la printempaj ferioj Gresillon estis tia loko. Grupoj de geknaboj el diversaj francaj urboj renkontis alian el la itala urbo Cesena. Ŝajnas, ke la kontaktoj estis fruktodonaj, ke gvidantoj kaj gvidatoj multe ĝuis tiun komunan ĉeeston, kiu permesis al ĉiuj travivi tre interesajn spertojn. Ĉiuj esperas, ke denove venontjare ili renkontiĝos kun geknaboj el pli da landoj. La interesitaj instruistoj kaj kursgvidantoj bonvolu jam kontakti la Esperanto-Domon. Tiu renkonto okazos dum unu semajno, verŝajne inter la 1-a kaj 15-a de Aprilo 1979.

La programo de la prelegoj ankoraŭ ne estas tute kompleta sed ĝi estos tiel varia kaj interesa, kiel kutime. Se ĉeestantoj de la unua periodo deziras labori ni povos kontentigi ilin ĉar gvidantoj estas pretaj proponi diversnivelajn kursojn. Sed tiuj el vi, kiuj deziras ĉeesti tiun unuan periodon rapidu. Restas logebleco preskaŭ nur en komunaj ĉambroj. Por la aliaj periodoj ankoraŭ restas kelkaj litoj nerezervitaj. Sed post kelkaj semajnoj, laŭ la nombro da informpetoj, ni verŝajne devos rifuzi aliĝojn.

Kiel kutime, rapidu !

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko
(vidu eltiraĵon, paĝo 10)

Prezo : 36,00 FF

Esperanto tra la Mondo

La universala kongreso estos amasa !

Oni antaŭvidas ke la universala kongreso en Varna kunigos eble kvar mil partoprenantojn kaj ĝi havas ŝancon esti la plej frekventata depost la milito.

— La kongresanoj povos partopreni allogajn manifestaciojn kaj ekskursojn post la kongreso : la oficiala postkongreso okazos en Smoljan ; tie oni inaŭguros internacian Esperanto-kursejon (kvinetaĝan !). Ekskurso iros aŭtobuse de Varna al Sofio ; alia direktiĝos al Istanbulo en Turkio. Estos ankaŭ Nigra-Mara tendaro en ripozkomplekso.

Por la ekskursa tago, oni povos elekti inter kvar tuttagaj vojaĝoj.

Pli ol 150 renkontoj, kongresoj, turismaj aranĝoj

Jam ne plu eblas publikigi en tiu rubriko la tre longan liston de ĉiuj esperantistaj manifestacioj kaj karavanoj, kiuj okazos dum 1978.

La elekto estas feliĉe pli kaj pli larĝa por la esperantistoj kaj, tiujare, oni povas citi proksimume 150 erojn en la « programo ». Niaj legantoj trovos tiun liston en « Esperanto », en « Heroldo » kaj ankaŭ en broŝuro eldonita de « Monda Turismo ».

Komputilo parolas Esperanton

Dum la jam tradicia seminario « Interlingvistiko » de la jara kongreso de Modernlingva Asocio de Usono, okazinta en Ĉikago, fine de Decembro, komputilo parolis en bonega Esperanto !

Temas pri la komputila eduksistemo de la universitato Illinois. Terminalo en la kongresejo estis telefone kunligita kun la centralo en la universitata urbo Urbana.

La referaĵo de D-ro Sherwood montris la elstaran kapablon de la instrusistemo por Esperanto. La aparato « parolas » klaran, bonan, perfekte homan Esperanton... Male, la maŝino kapablas elparoli nur robotecan, apenaŭ kompreneblan anglan lingvon, post pli komplikaj manipuladoj.

Parlamenta grupo en Romo

En Januaro, okazis la fondiĝa kunveno, en Romo, de la parlamenta grupo « Amikoj de Esperanto »

La provizora estraro konsistas el kvar senatanoj kaj tri deputitoj el 5 diversaj partioj.

Sama grupo jam ekzistas en Britio. Konvenus krei maksimuman nombron da similaj parlamentaj grupoj kaj starigi poste internacian parlamentan grupon.

La esperanta kabareto restariĝis en Parizo

La « Ruza kruĉo » naskiĝis : estas la nomo de la nova esperanto-kabareto en Parizo, kiu nun ludas ĉiumonate en salono de « Dupont-Bastille », Placo de la Bastille.

Nuntempe, ĉiuj artistoj estas TESPA-anoj (la esperanto-teatro). Por informoj... aŭ eniri la kabaretan teamon, skribu al : J. Le Puil, Pl. Lavoisier 5, App. 61, 93380 Pierrefitte (Francujo).

Ĉu vi iros al la Junularfestivalo en Kubo ?

La esperantistoj de Kubo provas impresi favore la aŭtoritatojn de la lando por Esperanto, okaze de la Monda Junularfestivalo, kiu okazos en Kubo, dum la somero... kondiĉe ke sufiĉe da junaj esperantistoj eksterlandaj vizitos tiun manifestacion !

Ĉiuokaze, se vi intencas vojaĝi al Kubo, nepre rilatu antaŭe kun Kuba Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 314, Habana 1, Kubo.

Por helpi Esperanton en la « Tria Mondo »...

... Vi povas sendi facilajn legaĵojn, gazetojn, materialon al :

— D-ro Joseph Megyeri, Al-Gomhouriyeh Hospital, Khormaksar, Aden, Yemen, P.D.R.

— D-ro P. Zurita, Faculdad de Ciencias Médicas, Esperanto-rondo, Universidad Central del Ecuadar. Quito, Ekvatoro.

— S-ro Abdul Ghaffar Falak, Vill : Hokraker, P.O. Gulehra Gali, Murree, Dist. Rawalpindi, Pakistano.

— Libana Esperanto-Instituto, P.O. Box 11.9254, Beyrut, Libano.

Novaj libroj

— « La granda kaldrono » : finfine estas publikigita la granda originala romano de John Francis (jam konata pere de la novelaro « Vitralo » kaj partopreno en la poema verko « Kvaropo »). La libro, preskaŭ 700-paĝa, priskribas la vivon de du skotaj familioj dum la du mondmilitoj.

— « Trigroŝa romano » de Bertolt Brecht ; tradukis Karl Schulze. Tiu romano de la konata verkisto estis skribita en 1934. Ĝi estas malpli konata eksterlande ol la « Opero » de sama aŭtoro.

— « Je la flanko de la profeto », rekte skribita en Esperanto de Prof. Chiussi (kiu jam tradukis la Koranon), proksimigas al ni la islamajn kulturon kaj penson.

— « Frithjof-sagao » : dulingva versa traduko de sveda nacia eposo.

— « La Justuloj » de Albert Camus, tradukita de G. Lagrange.

— « Izolo », poemaro de nia granda K. Kalocsay.

— « Slovaka Antologio » ; preskaŭ 90 aŭtoroj, ekde la 9a jarcento ĝis nuntempe. Jen antologio kiu viciĝas en la jam impona kaj valorega serio de naciaj antologioj eldonitaj en Esperanto.

— « Estona soveta poezio », tradukoj de Hilda Dresen (36 modernaj estonaj poetoj).

— « Malmalice » poemaro de Johan Valano (Claude Piron).

— « Trezorinsulo », la fama verko de Stevenson, tradukita de Grace Kirkwood.

Ĉu vi konas T.A.N.E.F. ?

T.A.N.E.F. estas la Esperanto-fako de la Turista Asocio « La Naturamikoj », laborista, populara asocio kiu disponas pri pli ol 750 turistaj domoj kaj estas ĉefe forta en Germanujo, Svisujo, Aŭstrujo. Tamen, estas membroj en 14 landoj.

En la statuto de la asocio estas skribite : « Favorigado kaj subteno de la klopodoj por internacia lingvo, ekzemple Esperanto ». Krome, la kotizmarko, kiu validas en ĉiuj landoj, estas presita nur en Esperanto ! Do, se la asocio povas interesi vin, subtenu nepre la agadon de T.A.N.E.F., kiu eldonas bultenon « La Migranto ». Petu ĝin kaj informojn de S-ino Erna Döring, Spalenvorstadt 7, CH — 4051, Basel, Svislando.

Ĉu vi ŝatas ŝakon ?

En Varna, dum la universala kongreso, okazos ŝakfestivalo kaj jubilea kunsido de Esperantista Ŝak-Ligo Internacia. La ligo eldonas bultenon kaj organizas ankaŭ perkorespondajn turnirojn. Adreso : S-ro L. Fiala, CS-290-01, Podebrady, Ĉekoslovakio.

ANĴUO

Joachim du Bellay ame kaj romantike prikantis Anĵuon ; li naskiĝis en Lire, fronte al Ancenis, rande de Luaro (1522-1560).

Dum lia restado en Romo, li sopiris pri sia naskiĝloko : « Pli ol la Romaj palacoj, li preferis la domon, kiun konstruis liaj prauloj ; Pli ol la marmoro, la fajnan ardezon, Pli ol la latina Tibro, la Gallian Luaron, Pli ol la mara aero, la Anĵuan dolĉecon ».

La fajna ardezo naskiĝis en la nokto de tre malproksimaj tempoj ; en la primara erao, dum la hercinia terfalto, sub enormaj premoj kaj temperaturoj, eroj de argilo, kvarco, aluminaj silikatoj aglomeriĝis por formi ardezon. Tiu ardezo, tiel rezistema kiel granito, dum jarmiloj elportis la premegon de la rokoj kaj teroj, kiuj ĝin kovris. Eksterordinara materialo nedifektebla, nebrulebla, akvimuna ; oni povas facile kaj tre maldike ĝin lamenigi.

Apud la malhelaj armorikaj teroj, blankas, dekstre de Luaro, la sedimentaj kretaceaj terenoj. Estas la tofo (la Anĵua « tuffeau »).

Malgraŭ sia polva aspekto, ĝi rezistis al la tempo kaj al la pluvakvoj, kiujn ĝi tralasas ; ĝi servas por skulptarto kaj por la konstruado de radie blankaj domoj. En tiu tofo troviĝas la vastaj keloj profunde kavigitaj en la roko : malnovaj ŝtonminoj iĝintaj, en kelkaj lokoj, trogloditaj domoj.

La Anĵua dolĉeco, pli ol klimata realeco, estas kvalito de la lumo, kiu harmoniigas la malhelecon de la ardezo kun la blankeco de la tofo ; certe oceana dolĉeco malpliigas la riskon de vintraj frostoj ; la nuboj elvenintaj el oceano jam ellasis siajn akvojn sur Armorikon.

Favora klimato, riĉa grundo favorigas la vegetalan vivon : sur la dekstra bordo de Luaro, la sablo-argilaj terenoj estas riĉaj je plantovartejoj : ornam-plantoj, floroj, semoj, bulboj ; de kelkaj jaroj, la kultivoj iĝis intensaj, precipe dank'al la flordomoj. La abundaj multspeciaj legomkulturoj memorigas, ke tiu regiono, ĉiutempe, apartenis al la fama « Ĝardeno de Francujo ».

Tie ĉi vito estas ĉie ; el 380 komunumoj, nur 10 ne ĝin kultivas. Vito estas tenaca planto : kvar jaroj estas necesaj por adoltigi rebon, kiu estos produktiva dum 50 jaroj ; ĝi kapablas rezisti al granda sekeco, kiel tiu de 1976. La vitejoj etendiĝas sur la montetoj, dekstre de Luaro-valo kaj rande de Layon, malgranda alfluanto de la rivero Maine, kiu ĵetiĝas en Luaron.

Ankaŭ sudokcidente de Angers, la vitejoj kovras la skistojn de Savennieres ; kaj la kalkaj grundoj de la Saumur-regiono formas la Malgrandan Ĉampanion ; tie ĉi oni fabrikas ĉampanizitajn ŝaŭm-vinojn, kiuj maljuniĝas en la tofaj vinkeloj.



La rozaj vinoj (Kabernet) estas eltiritaj el ruĝaj vinberoj : Gamay el burgonja origino ; Groslot, el nekonata origino sed tre produktiva ; Cot, malpli produktiva. Okaze de sunaj aŭtunoj, la mosto povas titri 12-14° kaj eĉ pli. La vino estas riĉaĵo por la vinkulturistoj, kiuj konfesas : « Kelkoje vito ruinigas ; sed poste, bone malruinigas ! ».

Tavolo de bona tero kovras la malnovajn ŝtonminojn ; ĝi ebligas riĉajn paŝtejojn ; kaj ilia sterko estas uzata por multabunde kreskigi fungojn en tiuj tofaj keloj.

INDUSTRIOJ

Vino-ellaborado, ĉampanizado, enboteligado, barelfabrikado postulas multnombrajn laboristojn. Ellaborataj ĉi tie la Cointreau-likvoroj estas monde konataj ; eĉ ili havas filialojn en tuta Eŭropo kaj en Ameriko. Aliaj nutraj industrioj : farunejoj, enladigejoj. La kulturo de lino kaj kanabo nutras tekstajn industriojn, jam de tre longe ekzistantajn : la « eta naztuko » de Cholet, toloj, ŝtofoj. La prospera bredado de dika brutaro, en la riĉaj herbejoj, liveras ledojn al la ŝu-faristoj.

Ardezoj de Trelaze ; ferminoj de Segre kaj ferajejoj ; blankaj kaj ruĝaj argiloj por la potaĵoj ; ligno-ŝueioj ; diversaj kulturoj kaj diversaj industrioj okupas multajn manlaboristojn kaj nutras gravan komercon en tuta Francujo kaj eksterlanden. Angers arigas la administraciajn oficejojn : Financoj, Justico, Armeo, Aviado.

SPORTA VIVO

Ĉasado en la grandaj arbaroj de la regiono : Chandelais, Chambiers, Monnoye, La Breille — Nuaille, Vezins, Maulevrier.

Fišado, Velnavigado sur riveroj, lagoj, lagetoj.

Kaj la eksterordinara Kavaleria-Lernejo de Saumur, kies grandfaroj estas konataj en la tuta mondo.

IOM DA HISTORIO

PRAHISTORIO

Homo ĉi tie aperis proksimume antaŭ 400.000 jaroj. Oni retrovis Aĉeŭleajn ilojn sur la teraso, kiu randas Loir, la alfluanton de Maine.

En Neolitika epoko, 3.000 jaroj ant. K. la loĝantoj hakis en la Baugea grejso gravajn megalitojn. Nune oni povas vidi 50 bonstatajn dolmenojn kaj 73 starajn menhirojn.

La kelta vorto CARN, kiu signifas potenca, lerta, kvalifikas la tiaman loĝanton.

Romania konkero ; post longa rezistado, la Galla ĉefo Dumnac estis venkita de Crassus en Juvigne-sur-Luaro. La Romanoj nomis la ĉi-tieulojn Andes, sed Pline kaj Tacite uzis la vorton Andegaves. Cezaro skribis pri la « molles Andegavi » ; sendube tiuj ĉi sciis ĝui la dolĉecon de la klimato. Ilia « civitas », malpli granda ol la hodiaŭa departemento, nombris 200.000 loĝantojn. En la unua jarcento Aŭgusto nomis la Andegavi-an ĉefurbon : Juliomagus.

KRISTANIGADO

Meze de la 4-a jarcento, kristana komunumo ekzistis en Angers : St-Martin de Tours, St-Florent, St-Maurille, St-Macaire estis ĝiaj apostoloj. En Angers, la multaj abatejoj transvivis Reformacion, Revolucion kaj la fluojn de la moderna vivo. Kelkaj (St-Serge, Toussaint, Ronceray, Jacobins, St-Nicolas) ŝirmas modernajn organismojn (C.E.S., Turismo-oficejo, Lernejo pri Arto kaj Metioj, Ĝendarmejo, Maljunulejo, Gimnazio, Urbodomo).

En la departemento, ofte vizitataj de la turistoj, estas Fontevrault, Cunault, St-Florent, la Boissière (cistercia), Bellefontaine.

IMPERIO DE LA PLANTAGENET, GRAFOJ DE ANĴUO

En la 10-a jarcento, Henri Plantagenet (« genistoplanto », ĉar Henriko amis meti sur sian ĉapelon, brancon de genisto) estas potenca sinjoro.

De sia patro, li heredis : Anjou, Maine, Touraine.

De sia patrino, nepino de Guillaume le Conquérant, li heredis Normandion, kaj la Britan Reĝejon.

Dank'al sia edziĝo kun Alienor d'Aquitaine, la landlimoj de lia imperio atingis sude Pireneojn, norde la Hebridojn ; ĝi arigis du grandajn civilizaciojn : norde, tiun de oil-lingvo, sude tiun de oc-lingvo.

La francaj reĝoj, Henri II kaj Philippe-Aŭguste (precipe tiu ĉi) atakas tiun potencon. En 1214, iom antaŭ la batalo de Bouvines, en La Roche-aux-Moines, la filo de Henri Plantagenet, Jean -Sans- Terre, estas venkita kaj senigita je siaj francaj teroj.

LA REĜO RENE (1409-1480)

Rene, duko de Anĵuo, naskiĝinta en Angers, estas la unua historiulo de la urbo Angers. Li estas duko de Anĵuo, de Provenco, kaj reĝo de Napolo. La Bona Reĝo Rene estas, en Angers, ĝentila, familiara ; ankaŭ amatoro je ĝardenoj, je bonaj vinoj kaj ankaŭ poeto samtempe leĝera kaj mistika. Sed li forlasas Anĵuon kaj preferas vivi en Provenco, kie lia malgranda kortego iĝis fama literatura rondo.

LA PROTESTANTA AKADEMIO DE SAUMUR

Dum la nokto de la St-Bartolomeo en 1572, la katolikoj masakris la protestantojn. En 1589, la protestanto Henri de Navarre, la baldaŭa Henriko la 4-a, konfidas al Duplessis-Mornay la fortikan urbon Saumur, kiu iĝas « dua Ĝenevo » ; ĝia 6-klasa gimnazio, ĝia akademio formas protestantajn pastrojn, de originoj angla, germana, svisa, franca ; ĝia ekzistado favorigas la disvolvadon de presejoj : 20 presejoj (11 en Angers) el kiuj 12 eldonas nur religiajn librojn. Iom post la Nuligo de la Nantes-Edikto en 1685, Louis XIV fermigas la akademion.

LA REVOLUCIO DE 1789

La kampara Anĵuo, ĉiame kristana, kontraŭiĝis al la Civila konstitucio de la Klerikaro. La Vendeanoj, komanditaj de la generaloj d'Elbée, La Rochejaquelin, Stofflet, Cathelineau, Bonchamp havas nur rudimentajn armilojn. Estas la terura lukto de la Blank-uloj kontraŭ la Blu-uloj, la soldatoj de la Respubliko komanditaj de Kleber.

KULTURAJ RIĈAĴOJ

LA KASTELOJ

La kastelo de Angers, bone konservita, havas enormajn trunkitajn turojn. En la 13-a jarcento, ĝi estis potenca fortreso, konstruita sur la loko de la malnova « oppidum » por Blanche de Castille.

ALIAJ KASTELOJ

Serrant, le Plessis-Macé, le Plessis-Bourré, Montgeoffroy, Brissac, Montreuil-Bellay, Saumur, Montsoreau, Durtal. En Baugé, la kastelo de la Reĝo Rene.

Velo-mueliloj kaj Vent-mueliloj en Brissac, Montsoreau, Savennières, Thouarcé, Villevêque, Montreuil-Bellay.

MUZEOJ

En Angers **la fama Tapiŝo de la Apokalipso de St-Jean,** longa je 107,5 m kaj konstituita el 70 tapiŝoj.

En la muzeo Lurçat, alia fama tapiŝo : La **Kanto de la Mondo.**

Muzeo de Paleontologio, de Geologio.

Muzeo de egiptaj antikvaĵoj, de pentraĵoj, de japanaj kaj ĉinaj gravuraĵoj.

KATEDRALOJ

St-Maurice montras fajne skulptitajn « sidfakojn », katedron, orgen-meblaĵon, tapiŝojn el Aubusson kaj siajn du grandajn turpintojn, kiuj enkadrigas la belfridon.

La Trinité, la Kanonikejo St-Martin ; el la preĝejo St-Martin restas 54-metran turon, romanikan klostron kaj grandajn restaŭrigitajn ĉambrojn.

La Anĵua gotika stilo de la 12-a jarcento estas tre speciala : ĝiaj harmoniaj kolonoj multigis la volbojn trasulkitajn je multaj nervuroj kaj igis la stilon leĝera kaj luma.

KOREKTO

En la lasta numero, la artikolo « Ikaro ĉiama » estis eltirita el « l'été grec » de J. Laccarière.

Tiu informo bedaŭrinde malaperis pro eraro de la presisto. Bonvolu senkulpigi nin.

NOVAJ ENERGIO-FONTOJ

La spacaj programoj alportis al niaj nuntempaj teknikoj gravajn perfektigadojn, kiuj permesas esperi grandegajn progresojn en diversaj sferoj : ĉe produktado de elektro en regionoj malproksimaj je Centroj, ĉe aŭtomobila industrio, ĉe esplorado de la grandaj maraj profundaĵoj, ĉe komunikiloj, ĉe energio-fontoj por domaj kaj komercaj uzaĵoj, ĉe lukto kontraŭ aer-polucio.

Brul-piloj

NASA ilin perfektigis por daŭre vivigi la astronaŭtojn en la hermetaj spacaj fuzeoj. Ili de nun helpas por plibonigi la vivkondiĉojn sur Tero kaj en la profundaĵoj de oceanoj. Oni jam provis ilin uzi ĉe antaŭenirado de elektraj aŭtomobiloj.

Antaŭ nelonge Allis-Chalmer kompanio prezentis agrokulturan traktoron kaj turisman veturilon ekipitajn je brul-piloj nutritaj per hidrokarbonidoj ; nur iom da tempo estas necesa por ilin komercialigi ; ili ne polucios aeron. Oni povas fabriki brulpilon kun benzino, kiu sufiĉe malmulte-koste alportos energio-fonton al domoj kaj komercaj ejoj.

Nukleaj generatoroj

NASA uzis nukleajn generatorojn ĉe la spacaj veseloj ; nune oni provas konstrui solidajn ne tro grandajn nukleajn generatorojn uzeblajn sur Tero kaj en Oceanoj. Tiuj generatoroj, kun radio-izotopoj, kies potenco varias inter 3 kaj 50 ŭatoj celas unue ekipi relajso-staciojn por la komuniko-sistemoj, oleoduktojn kaj ĉiun izolatan regionon ne facile alireblan, kie la uzata materialo devas longtempe funkcii por eviti malfacilan kaj multekostan kontrolon ; tia generatoro funkciigas, sub maro, ĉe Meksikio-golfo, la kontrol-sistemon de petrolo-puto ; alia sama nuklea generatoro funkciigas navig-aparatojn.

Sunaj ĉeloj

Duono el la spacaj veseloj jam lanĉitaj estis ekipitaj je sunaj ĉeloj sub formo de rigidaj paneloj disvolveblaj. Post perfektigado ili hodiaŭ eniras en industriojn kaj en komuniko-sistemojn. En evoluiĝintaj landoj, precipe ĉe dezertaj kaj tropikaj regionoj tiu nova energio-fonto proponas multajn aplikaĵojn. En Japanujo, ekstere de la radio-aparatoj kun transistoroj, la fabrikantoj sukcesis fiksi tre malgrandan sunan baterion, kiu anstataŭas la tradiciajn pilojn.

Akumulatoro kun kadmio-nikelo

La spaca programo bezonis generatorojn tute etajn sed kun forta energetika denseco kaj perfekta funkciado ; tio kondukis al plibonigado de la akumulatoroj kun kadmio-nikelo ; jam oni uzas ilin en la ĉiutaga vivo : ĉe aŭdo-aparato por plibonigi aŭdadon ; ĉe televida kamero, kiu pezas malpli ol 700 gr. kaj estas apenaŭ pli dika ol granda cigared-skatolo ; ĝi unue servis por fotografi la disiĝon, dum flugado, de la diversaj etaĝoj de Saturne V. Nune oni uzas ĝin en USONO por kontroli la industriajn procezojn. En Francio, kinokamero funkcias dank'al tiu malgranda akumulatoro reŝarĝita pere de suna ĉelo.

Nune oni povas adaptigi tiajn bateriojn al aŭtomobiloj ; tiuj ĉi, por urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, funkcios dum 300 km. sen reŝarĝo ; tiuj akumulatoroj povas esti reŝarĝitaj plurajn dekojn da fojoj ; tamen ilia potenco restas limigita.

Hodiaŭ oni ankaŭ studas por perfektigi akumulatorojn kun arĝento-kadmio aŭ kun arĝento-zingo, cele al spaca kaj submara esploradoj. Oni celas pliigi potencon, rapidecon kaj sendependecon de elektraj veturiloj.

Nova atoma generatoro

Ĝi rekte transformas la varmon liveritan de radio-aktiva izotopo en elektran energion ; la eteta generatoro nomita « ISOMITE » estas energio-fonto sub tre granda volumeno kaj kun malmulta potenco (de mikro al miliŭato) ; ĝi tamen liveras centfoje pli da energio ol kemiaj akumulatoroj sampezaj ; ĝia longedaŭra funkciado igas ĝin utila kora stimulilo enigita en la korpon de malsanulo ; utila ankaŭ ĝi estas ĉe submara ekipaĵo kaj en izolataj regionoj.

La generatoro « Betacel » rekte produktas nukleajn radiadojn kun febla intenseco sed sen bezono de termika energio ; ĝi estas konstituita el maldikaj tabeletoj el duon-konduktilaj materialoj ; tavoloj el « prometheum 417 » aŭ el alia radio-aktiva izotopo apartigas tiujn tabeletojn ; oni povas obteni tensiojn tre diversajn laŭ la nombro de la tavoloj.

Pli malgranda ol « ISOMITE » «Betacel » havas plibonan rendimenton ĉe malfortaj potencoj ; ĝi taŭgas por malgrandaj instrumentoj, ĉe medicinaj telemezuraj aparatoj, ĉe protezoj, ĉe brak-horloĝoj, ĉe kromaj energio-fontoj necesaj en la spacaj veseloj.

En Harwell, B.E.R.E.-Societo dediĉis pli ol unu miliono da dolaroj, en la 5 lastaj jaroj, por krei ensemblon de baterioj kun izotopoj ; ĝi servis por ekipi britan buon en Dungeness.

En U.R.S.S. tuta ĉeno da meteorologiaj stacioj funkcias pere de nukleaj baterioj.

En Valley Forge la serĉistoj de la « General Electric » sukcesis eltiri elektran kurenton el la korpo de bestoj ; tio permesas pensi, ke, en estonteco, la aparatoj lokitaj en korpo de malsanulo (ekz : la kora stimulilo) ne plu bezonos akumulatoron sed uzos la kurenton eligitan de la korpo mem ; plue tiamaniere la radio-sendilo rekte kaj seninterrompe sendos sciigojn al la kuracisto.

el Courrier de l'U.N.E.S.C.O.

HERAKLO

Heraklo estis tre populara heroo. Liaj heroaĵoj igis lin grandfamulo. Reale, la mito de Heraklo estas Simbolo. Simbolo de la Homa lukto kontraŭ siaj Internaj Demonoj. Li estas filo de Zeŭso, la Dio, la Spirita Potenco, kaj de Alkmena, la Virino, kiun la antikvuloj konsideris kiel la Materialisman Potencon (la Eva Tentantino). En la homa animo, la Plejbono batalas kontraŭ la Malplejbono. Cetere, Heraklo triumfos nur helpe de la dioj.

Heraklo estas titolo, komuna al pluraj herooj de la antikvaj tempoj. Diodoro de Sicilio citas 3 Heraklojn : Unu egipta, kiu vivis 10 000 jarojn antaŭ la Trojo-milito ; Unu Kretano, sendube tiu, kiu protektis la junan Zeŭson ; kaj la filo de Alkmena kaj Zeŭso. Cicerono citas 6 Heraklojn. Herodoto diras lin fenica : la Fenicoj alportis la epopeon de Gilgamesh ; de tiu heroo Heraklo heredis la ĉefajn ecojn : la kara amiko de Gilgamesh estas Enkiku, por Heraklo estas lia nevo Iolaos ; Gilgamesh perdiĝas pro sia amo al la diino Ištar, Heraklo pro lia amo al Deĵanira. Ambaŭ naskiĝis el dio ; Unu kaj alia vizitas Inferon ; unu kaj alia mortigis leonojn kaj triumfis super diaj taŭroj ; Ambaŭ deziris Senmortecon.

Naskiĝo de Heraklo

Alkmena (kiu signifas : Potenco de Luno) estis la micena nomo de Hera ; en tiu epoko la sankta reĝo, kiu defendis Hera kontraŭ la Akajano Perseo (la Detruanto) nomiĝis Heraklo.

Zeŭso unuiĝas al Alkmena, edzino de Amfitriono, reĝo de Tirinto. Zeŭso elektis Alkmenan, ĉar « nur ŝi povas naski unu filon sufiĉe potencan por protekti la homojn kaj la diojn ». Li prenis la formon de Amfitriono, kaj klopodis ŝin ĉarmi per teneraj vortoj kaj karesoj. Li komandas al Helios estingi la sunajn radiojn, al Hermeso malrapidigi la lunon kaj al Dormo endormigi la homojn, por ke ili tute ne rimarku kio okazas. Zeŭso flirtas kun ŝi tutan nokton (kiu reale estis 3 noktoj) ĉar generado de heroo tiom grava, kiel tiu, kiun Zeŭso meditis krei, ne povas haste efektiviĝi.

Sed Hera multobligas la inicajn provojn. Unue (ĉar la duenaskito estas destinita al buĉofero) ŝi malfruigas la naskiĝon de Heraklo por ke li estu tiu duenaskito ; pro interveno de Zeŭso, ŝi akceptas, ke Heraklo pli longe vivu por montri siajn kapablojn. Heraklo naskiĝas en Tebo ; tiam li nomiĝas Alcido, kiel sia patrina avo : Alceo (la Potenculo) ; nur post liaj unuaj heroaĵoj oni nomos lin Heraklo. La infano estas en sia lulilo ; Hera sendas kontraŭ lin du terurajn serpentojn ; la infano estas forta, li ne timas ; li strangolas la serpentojn. La mito jam parolas : la Homa Estaĵo kapablas venki la Vantecon, kiun simbolas la serpentoj.

La dioj kliniĝis super lian lulilon

Heraklo havis ne nur eksterordinaran forton, sed la dioj instruis al li la muzikon la ĉar-kuradon, la lukton, la praktikadon de la armiloj. Li tajlis sian klabon en sovaĝa arbotradicie uzata por forpeli la malbonajn spiritojn.

Heraklo superis ĉiujn arkistojn. Primitive, por eniri en la arkistan korporacion, la kandidato devis pafi tra or-ringa serpento starita sur ĉapo de reĝa infano ; aŭ tra la supra ringo de kasko, aŭ tra la kurbigitaj klingoj de duobla hakilo. Pli poste la arkistoj, iĝintaj pli lertaj, pafis tra vico da ringoj aŭ vico da hakiloj. La grekaj arkistoj streĉis la ŝnuron ĝis la brusto ; sed Heraklo, kiu ricevis instruon de la Scito Teŭtaros, streĉis ĝin ĝis la orelo ; tial lia sago ricevis pli fortan impulson.

La granda forto de Heraklo simbolas la homan impeton al Pureco. Dank'al sia fizika forto, dank'al siaj sagoj li mortigas la leonon de Citerio, kiu teruregis la regionon ; li protektas la Tebanojn kontraŭ la krueleco kaj la avideco de Likos. Sed la Malbono-Fortoj sin venĝas : ili igas Heraklon freneza ; li mortigas siajn infanojn. Li iras al Delfo por peti pardonon de Apolono. La Pitio sendas lin al Miceno, kie Eŭristeo trudas al li la pentopunajn Laborojn.

La monstraj bestoj simbolas la Internajn Demonojn. Nek liaj sagoj, nek lia klabo sukcesis mortigi la **Leonon de Nemeo,** kiu teruregis la valon ; li strangolas la monstron ; li sin vestas per ĝia felo, kun kiu oni reprezentis lin ĉe ŝkulptaĵoj kaj ceramikoj. (La Homo triumfis super la Krueleco, kiu vivas en la homa koro ; la leonofelo donas al la heroo la Majestecon kiun oni atribuis al la reĝo de la bestoj).

La Hidro de Lerne havis, laŭ la legendoj, 7 aŭ 100 brakojn kun kapoj, inter kiuj unu estis nemortigebla Eble ĝin inspiris la marĉoj de Lerne, kiujn nutris multaj fontoj ; kaj kiujn eble Heraklo devis dreni. La Danaidinoj estis pastrinoj de Lerne kaj ankaŭ de Tetisa, kies simbolo estis la polpo ; ĝi figuris sur la grekaj moneroj kun 7 brakoj finiĝantaj per kapoj. Heraklo atakas per sia klabo ; laŭ la konsilo de Hera, Iolaos lia nevo cikatras la vundojn por ke la kapoj ne

rekreiĝu. Heraklo sufokas, sub roko, la nemortigeblan kapon ; por momento la Malbono estas neniigita. Tiuj kapoj, diras S-ro Diel, estas la multaj malvirtoj, kiujn oni devas elradikigi el la animo unu post la alia, ĝis la lasta : la orgojlo sin vidi nemortigebla.

La Birdoj de la lago Stimfalo nutriĝis je homa karno. Denove Atena intervenas ; ŝi donas al Heraklo knarilon por timigi la birdojn ; ili forflugas kaj la heroo ilin sage mortigas. Tiuj kaskoportaj birdoj figuris sur la moneroj de Stimfalo (Ili similas la gruojn, de la anglaj mezepokaj skulptaĵoj, kiuj sucis la spiron de la malsanuloj). Tiuj birdoj personigis la febron ; en la antikvaj tempoj oni uzis knarilon aŭ kastanjetojn por forpeli la febrajn demonojn (ankoraŭ hodiaŭ en sovaĝaj gentoj). La flugado de tiuj birdoj super la stagnantaj akvoj ŝvebigas la ombron de perversaj deziroj (Stimfalo signifas : seksaj praktikoj).

La Apro, ĉe la antikvuloj, reprezentas la Materialisman Forton. Heraklo mortigas la **Apron de Erimanto,** la sovaĝan porkon, simbolon de dibočado ; la lukto okazis sur neĝo ; la blankeco de tiu neĝo montras deziron de pureco. Estas la triumfo de Intelekto super Besteco. Tiu sukceso kolerigas la Malbonajn Fortojn : Heraklo renkontas la Centaŭrojn ; ili kune festenas ; sed la vin-odoro furiozigas la centaŭrojn ; sin defendante Heraklo vundas Kirono kaj Folos, kiuj mortas ; Kirono kaj Folos estis liaj amikoj.

La Cervino de Cerinio estas la cervino de Artemisa, kun bronzaj hufoj, oraj kornoj, simboloj de forta Animo. Heraklo devas ĝin vivantan alporti al Miceno. Li postkuras ĝin dum unu jaro, ĝis Hiperboreujo ; kaptas ĝin kaj ĝin alportas sur siaj ŝultroj. Tiu postkurado de la Cervino estas serĉado de la Saĝeco ; Hiperboreujo simbolas Sciadon.

En Olimpio Heraklo devas purigi la **stalajn kampojn de Augias** ; li fordirektas la riveron Kladeos, kiu fluas sur la kampojn kaj ilin purigas (purigi monteton, ĝin prisemi estis provoj, kiujn oni trudis al estonta reĝo). Heraklo mortigos Augias, kiu rifuzis pagi la promesitan salajron : parton de la brutaro. Heraklo revenos al Olimpio por reorganizi la Ludojn.

Heraklo luktas kontraŭ la **Kreta Minotaŭro,** superas ĝian brutalan forton, sed ne definitive, ĉar li liberigas la beston. Li mortigas **Diomedon,** kiu manĝigis siajn gastojn al siaj ĉevalinoj (la animoj-manĝantinoj). Li triumfas super **Anteo** kaj **Geriono,** malamantoj de la ĉielaj dioj kaj simboloj de la teraj ĝuoj.

Heraklo luktas kontraŭ la Amazonoj, kiuj kontraŭstaris la Grekojn. Li enamiĝas al Hipolita ilia reĝino, sed pro interveno de Hera, li ŝin akcidente mortigas. La Grekoj, ĉi tie esprimis sian mizoginecon, sian lukton kontraŭ la Virinoj, kiuj kredis sin diaj.

Heraklo helpas la Grekojn, kontraŭ la Gigantoj, kontraŭ la Trojanoj ; li liberigas Promoteon ; mortigas la egiptan reĝon Busiris, kiu buĉoferis la fremdulojn ; kaptas la Pigmeojn, kiuj vivis ĉe fontoj de Nilo (tiuj Pigmeoj simbolis la homon sen kapabloj sed fanfarona). Ekstreme de Eŭropo, li tranĉas la monton kaj starigas la Kolonojn de Heraklo.

Sed Heraklo alproksimiĝas al la dioj

Li jam kaptis la Cervinon de Cerinio. Jen li estas en **la Ĝardeno de la Hesperidinoj.** Bareliefo en Olimpio ilustras la scenon : Atlas estas la gardisto de la Ĝardeno kun la serpento, kiu ĉirkaŭas la Or-poman arbon. La serpento ne lasos Heraklon alproksimiĝi. Tial tiu ĉi prenas, sur siajn ŝultrojn, la ŝarĝon de Atlas (la portado de la ĉielo). Dume Atlas kolektas kaj donas la 3 Or-pomojn, kiujn Heraklo devas porti al Miceno. Atena estas ĉi tie : per sia levita mano, ŝi helpas la heroon.

Ĉar Pomo donis senmortecon, Heraklo iĝis dio ; ĉar li estas dio, li povas eniri en la Inferon kie li devas kapti **la trikapan Cerberon.** Kun helpo de Orfeo kaj Atena, li kaptas la monstron kaj liberigas Tezeon ; li kondukas Cerberon al Eŭristeo, kiu estas tiel timigita, ke li ordonas, ke oni liberigu la monstron.

Lasta elprovo atendas Heraklon : **la Centaŭro Nesso** volas forrabi Deĵaniran. Heraklo sage vundas lin. Por sin venĝi Nesso donas al la virino iom da sia sango : amiga trinkaĵo — li diras —. Reale estas tokso. Tunikon por sia edzo Deĵanira trempas en tiun likvaĵon, kiu tiom suferigas Heraklon, ke li sin ĵetas en ŝtiparon — purigan ŝtiparon. Heraklo leviĝas al Olimpo, al Senmorteco.

La ciklo de Heraklo etendiĝas al tuta Grekujo, al Eŭropo, al Egiptujo, al Mezazio ; ĝi laŭsekvas la komercan kaj kolonian ekspansion de Grekujo. Ĝi atestas ankaŭ la evoluadon de la geografiaj kaj astronomiaj scioj (tiam aperis nocioj pri sfereco de la tero kaj pri alfabeto).

Meŝa SELIMOVIC

LA DERVIŜO KAJ LA MORTO

(fragmento)

Bismilahir-rahmanir rahim *

Mi kiel atestanton vokas la inkujon kaj la plumon kaj tion per [plumo skribatan ;

Mi kiel atestanton vokas la necertan malhelon de l'krepusko [kaj la nokton kaj ĉion de ĝi vivigatan ;

Mi kiel atestanton vokas la lunon plenŝvelan kaj la novan aŭro- [ron blankiĝan ;

Mi kiel atestanton vokas la lastan juĝon kaj tiun animon mem [sin skoldan ;

Mi kiel atestanton vokas la tempon, la komencon kaj la finon [de ĉio — ke ĉiu homo ĉiam estas perdanta (1)

Mi komencas tiun ĉi mian rakonton, nenial, sen utilo por mi nek por aliaj, pro bezono kiu estas pli forta ol la profito kaj la prudento, por ke restu ĉi postlasaĵo mia pri mi, ke estu skribita la turmento de interparolo kun mi men, kun la lontana espero ke troviĝos iu solvo kiam la kalkulo estos finpreta, se ĝi estos, kiam mi lasos spuron inkan sur ĉi tiu papero kiu atendas kiel defio. Mi ne scias kio estos notita, sed en la hokoj de la literoj restos io el tio, kio estadis en mi kaj ĝi ne perdiĝos plu en la vorticoj de l'nebulo, kvazaŭ ĝi ne estus aŭ mi ne scius kio ĝi estis. Tiel mi povas vidi min mem fariĝantan tiun mirindaĵon, kiun mi ne konas kaj ŝajnas al mi strange ke mi ne estis ĉiam tio, kio mi nun estas. Mi estas konscia, ke mi skribas implikite, mia mano tremas pro la malimplikado kiu baldaŭas, pro la juĝado kiun mi ekentreprenas, dum mi ĉe tiu proceso estas ĉio, kaj juĝisto kaj atestanto kaj akuzito. Ĉio mi estos tiom honeste, kiom mi povas, kiom iu povas, ĉar mi komencas dubi ke sincero kaj honesto estas la samo, sincero estas la konvinkiteco ke ni diras la veron (kaj kiu povas esti pri tio persvadita ?) dum la honestoj estas multaj kaj inter si ne akordas.

Mia nomo estas Aĥmed Nurudin, oni donis ĝin al mi kaj mi prenis tion, kion estis oferata, kun fiero, sed nun mi pensas pri ĝi, post longa viciĝo da jaroj, kiuj kunkreskis kun mi kiel haŭto, kun miro kaj fojfoje kun kaŝrido, ĉar **la lumo de la kredo** estas orgojlo, kiun mi eĉ ne sentis kaj pro tio mi nun eĉ iomete hontas Kia lumo estas mi ? De kio mi estas iluminita ? Ĉu de scio ? De supera instruo ? De pura koro ? De la ĝusta vojo ? De nedubo ? Ĉio fariĝis demando, kaj nun mi estas nur Aĥmed, nek ŝejko nek Nurudin. Ĉio falas de sur mi, kiel vesto, kiel kiraso, kaj restas tio, kio estis antaŭ ĉio, nuda haŭto kaj nuda homo.

Mi havas kvardek jarojn, malbela aĝo : homo estas tiam ankoraŭ juna, do kun deziroj, tamen jam maljuna por ilin realigi. Tiam en ĉiu estingiĝas la malkvietoj, tiel ke li fariĝas forta je kutimo kaj akirita sekureco en la senpovo kiu alvenas. Kaj nur nun mi faras tion, kio devis esti farita antaŭlonge, en la ŝvelriĉa florado de l'korpo, kiam ĉiuj sennombraj vojoj estas bonaj kaj ĉiuj deflankiĝoj tiel utilaj kiel la veroj. Domaĝe, ke mi ne havas dek jarojn pli kaj la maljuno gardus min kontraŭ ribelo, aŭ dek jarojn malpli kaj estus al mi egale. Ĉar tridekjareco estas juneco, tion mi opinias nun, kiam mi senrevene malproksimiĝis de ĝi, juneco kiu timas antaŭ neniu, eĉ ne antaŭ si mem.

Mi diris mirindan vorton : ribelo. Kaj mi haltigis la plumon super la rekta linio en kiu restis enstampita unu malcerto, tro facile eldirita. La unuan fojon mi tiel nomis mian turmenton, dum mi neniam antaŭe pensis pri ĝi, neniam mi nomis ĝin tiunome. De kie venis la danĝera vorto ? Kaj ĉu ĝi estas nur vorto ? Mi demandis min, ĉu ne estus pli bone interrompi ĉi tiun skribadon, por ke ne estu ĉio pli malfacila ol ĝi estas. Ĉar se ĝi per neklarigeblaj vojoj eltiradas el mi eĉ tion, kion mi ne volis diri, kio ne estis mia penso, aŭ estas mia nekonata penso kiu kaŝiĝis en la tenebro de mi, enkaptita de emocio, sento kiu ne plu obeas min, se ĉio ĉi estas tia, tiam la skribado estas senindulga juĝista enketo, ŝejtana * faro, kaj eble estus plej bone rompi la kanplumon atente entranĉitan ĉe la pinto, renversi la inkujon sur la slabon antaŭ la tekio *, ke ĝi per nigra makulo memorigu min neniam plu ekentrepreni magiaĵojn, kiuj vekas la malicajn demonojn. Ribelo ! Ĉu ĝi estas nur vorto aŭ penso ? Se ĝi estas penso, tiam ĝi estas mia penso aŭ mia devojiĝo. Se ĝi estas devojiĝo, ve al mi, se ĝi estas vero, ve al mi ankoraŭ pli.

Sed mi ne havas alian rimedon, al neniu mi povas tion diri, krom al mi mem kaj al la papero. Tial mi daŭrigis streki nehaltigeblajn liniojn, de dekstre maldekstren, de abismo ĝis abismo randa, de abismo ĝis abismo pensa, en longaj vicoj kiuj restas kiel atesto, aŭ akuzo. Kies akuzo, granda Dio, ĉar vi min lasis al la plej granda homa sufero, okupiĝi pri si mem, kies do ? kontraŭ kiu ? Kontraŭ mi aŭ kontraŭ la aliaj ? Sed ne plu estas savo, tiu ĉi skribado estas neeviteblo ; kiel la vivo, aŭ kiel la forkonsumiĝo. Estos tio, kio devas esti, kaj la kulpo estas mia, ĉar mi estas tio, kio mi estas, se ĝi estas kulpo. Ŝajnas al mi, ke ĉio ĝisradike ŝanĝiĝas, en mi ĉio tremskuiĝas ĉe la fundamento, kaj la mondo ŝanceliĝas kun mi, ĉar ankaŭ ĝi estas sen ordo, se en mi estas malordo, kvankam ja kaj tio kio okazas kaj tio kio estis, fontas el la sama kaŭzo : ke mi volas kaj devas respekti min mem. Sen tio, mi ne havas la forton vivi kiel homo. Ridindas eble, mi estis homo kun tio hieraŭa, kaj mi volas esti homo kun tio hodiaŭa, malsimila, eble eĉ kontraŭa, sed min tio ne konfufuzas, ĉar la homo estas ŝanĝo kaj malbone se ni ne aŭskultas la konsciencon, kiam ĝi manifestiĝas.

---

(1) **Moto tirita el la korano.**

Mi estas ŝejko de tekio de la Memlevia * ordeno, la plej multnombra kaj la plej pura. La tekio en kiu mi vivas troviĝas ĉe la eliro de la kasabo *, inter nigraj kaj malhelgrizaj gorĝoj, kiuj barkaŝas la spacojn de l'ĉielo, lasante nur bluan tratrancon super si, kiel avaran favoron kaj rememoran pri la disvastoj de l'senlima ĉielo de l'infanaĝo. Mi ne ŝatas ĝin, tiun foran rememoron, ĝi ĉiam pli torturas min, same kiel malatentita ebleco, kvankam mi ne scias kia. Tute neklare mi komparas la sukviglajn arbarojn super la patra domo, la kampojn kaj la fruktoĝardenojn ĉirkaŭ la lago, kun la ŝtona interkrutejo en kiu ni estas kaptitaj, mi kaj la tekio, kaj ŝajnas al mi ke troveblas multe da simileco inter ĉi tiu kunstreĉiĝo en mi kaj tiu ĉirkaŭ mi.

La tekio estas bela kaj vasta, kliniĝanta super rivereto kiu trahakas sin tra la ŝtono, el la montoj, kun ĝardeno kaj rozejo, kun pergolo super la verando, kun longa galerio en kiu la silento estas mola kiel vato, ankoraŭ pli silenta pro la mallaŭta lirlo de l'rojo sub ĝi. La domon, iaman haremon de la prapatroj, donacis al la ordeno la riĉa Alijaga Ĝuniĉ, por ke ĝi estu kunfluejo de dervišoj kaj rifuĝejo de malriĉuloj, « ĉar ili havas rompitan koron ». Per preĝoj kaj incenso ni forlavis la pekon de tiu domo, kaj la tekio akiris la famon de sankta loko, kvankam ni ne tute forpelis la ombrojn de la junaj virinoj. Kelkiam ŝajnis ke ili pasas tra la ĉambroj kaj ke sentiĝas ilia parfumo.

Ĉiu sciis, tial ankaŭ mi ne kaŝas, alie ĉi tiu skribado estus mensogo kiun mi konas (pro mensogo kiun oni ne konas, per kiu oni nekonscie trompas, neniu kulpas) ke la tekio kaj ĝia famo kaj ĝia sankteco, tio estis mi, ĝia fundamento kaj ĝia tegmento. Sen mi, ĝi estus kvinĉambra domo, simila al aliaj, kun mi ĝi fariĝis remparo de la kredo. Ĝi estis kvazaŭ la defendo de la kasabo kontraŭ konataj kaj nekonataj malbonoj, ĝia ŝirmanto, ĉar post la tekio aliaj domoj ne troviĝis. Densaj ĵaluzioj kaj dika muro ĉirkaŭ la ĝardeno igis nian izolecon pli dura kaj pli sekura, sed la portalo estas ĉiam malfermita, por ke eniru ĉiu por kiu estas bezona konsolo kaj purigo de la peko, kaj ni akceptis la homojn kun belaj vortoj kiam ili venis, kvankam ili estis pli malmultaj ol la mizeroj kaj multe pli malmultaj ol la pekoj.

Mi ne estas orgojla pro ĉi tiu posteno mia, sed ĝi estas vere servo al la religio, sincera kaj plena. Mi konsideris kiel devon kaj feliĉon gardi min kaj la aliajn kontraŭ peko. Ankaŭ min, vanus tion kaŝi. La pekaj pensoj estas kiel la vento, kiu haltigos ilin ? Kaj mi ne opinias ke tio estas granda malbono. El kio konsistas la pieco, se ne ekzistas tentoj kiujn oni bridas ? La homo ne estas Dio, kaj lia forto kuŝas ĝuste en tio, ke li kontraŭbaraktas sian naturon, tiel mi pensis, kaj se li ne havas ion por repuŝi, kia estas tiam lia merito ? Nun mi pri tio havas malsaman opinion, sed mi ne menciu tion, kio venos kiam necesos. Estos tempo por ĉio. Sur miaj genuoj estas la papero, kiu kviete atendas por ricevi mian ŝarĝon, ne deprenante ĝin de mi kaj ne sentante ĝin mem, antaŭ mi estas longa nokto sen dormo, kaj multaj longaj noktoj, por ĉio mi atingos, ĉion mi faros, kion mi devas fari, akuzos kaj defendos min, hasto ne estas necesa, kaj mi vidas ke estas aferoj pri kiuj mi povas skribi nune, kaj eble poste neniam plu. Kiam venos la tempo kaj la deziro eldiri la aliajn, ankaŭ ilia vico venos.

Mi sentas kiel ili staras amasigitaj en la provizejoj de mia cerbo, kaj tiras unu la alian, ĉar ili estas ligitaj, neniu el ili vivas sola por si, kaj tamen estas iu ordo en tiu ĉi kunpuŝiĝo, kaj ĉiam unu, mi ne scias kiel, elsaltas deinter la aliaj kaj eliras al la lumo, por sin montri, por skurĝi aŭ konsoli. Kelkfoje ili sin interŝovas, alimpetegas unu sur la alian, senpaciencaj, kvazaŭ ili timus resti neeldiritaj. Malrapide, por ĉio estas tempo, mi donis ĝin al mi mem kaj la proceso havas konfrontojn kaj atestadojn, ilin mi ne preterevitos kaj mi povas ĉe la fino verdikti al mi mem, ĉar nur pri mi temas, pri neniu alia, nur mi. La mondo subite fariĝis por mi sekreto, same kiel mi por la mondo, ni ekhaltis unu kontraŭ la alia, ni mire rigardas nin reciproke, ni ne rekonas unu la alian, ni ne interkompreniĝas plu.

Mi revenu denove al mi kaj al la tekio. Mi ĝin amis kaj amas. Ĝi estas silenta, pura, mia, ĝi odoras je tanaceto somere, je akra neĝo kaj vento vintre, mi amas ĝin ankaŭ tial ke ĝi fariĝis konata pro mi, kaj ĉar ĝi scias miajn sekretojn kiujn mi al neniu diradis, kiujn mi kaŝis eĉ de mi mem. Ĝi estas varma, kvieta, la kolomboj kveras sur la tegmento en la frua mateno, la pluvo falas sur la tegolaron kaj la kavbrikaron, ankaŭ nun ĝi falas, persista, longdaŭra, kvankam estas somero, ĝi forfluas tra la lignaj gutujoj en la nokton kiu misaŭgure kuŝiĝis sur la mondon, mi timas ke ĝi neniam foriros sed mi esperas ke la suno baldaŭ ellumos, mi amas ĝin ĉar mi estas protektata de la trankvilo de miaj du ĉambroj, en kiuj mi povas esti sola kiam mi ripozas de la homoj.

La rojo estas simila al mi, kelkiam ŝvela kaj bruska sed pli ofte silenta, neaŭdebla. Malplaĉis al mi, kiam oni ĝin digis sube de la tekio kaj per kanalo trudpelis esti obeema kaj utila, pasi tra la verŝotrunko por funkciigi la muelejan padelradon, kaj mi ĝojis kiam, akvopufa, ĝi disfrakasis la kluzpordeton kaj ekfluis libere. Kvankam mi sciis ke nur bridita, ĝi muelas la grenon.

Sed jen, la kolomboj en la subtegmento raportas per mallaŭta kverado, la pluvo ankoraŭ verŝiĝas, tiel jam de tagoj, kaj ili ne povas eliri sub la tegmenton, tio ĉi estas aŭguro de la tago kiu ankoraŭ ne venis. Ankoliziĝis la mano per kiu mi tenas la plumon, la kandelo mallaŭte tusetas kaj ŝprucigas etajn fajerojn sin defendante kontraŭ la morto, dum mi rigardas al la longaj vicoj de la literoj, al la celtabuloj de la pensoj, ne sciante ĉu mi ilin mortigis aŭ vivigis.

GLOSARO

Bismilahir-rahmanir rahim : En la nomo de Dio, ĉies bonfaranto, kompatoplena /komenciĝo de ĉiu ĉapitro en la Korano/

Ŝejtano : diablo /turke/

tekio : konstruaĵo en kiu vivas la dervišoj

Memlevia : dervişa ordeno

kasabo : musulmana urbeto, civito

(Sekvota)

el la serbokroata esperantigis

R. Imbert

PEĈJO

Sinjorino Lefebvre estis vilaĝanino, vidvino, iu el tiuj duonkamparaninoj kun rubando — kaj falbalhavaj ĉapeloj, iu el tiuj personoj, kiuj parolas kun ridigaj lingvaj eraroj, havas por la publiko grandiozajn manierojn kaj maskas animon de pretendema malbonulino sub ornamaĉitaj kaj komikaj eksteraĵoj, same kiel ili kaŝas siajn dikajn ruĝajn manojn per gantoj el kruda silko.

Ŝi havis servistinon bravan kamparaninon, tute simplan, kiu nomiĝis Rozo.

La du virinoj loĝis en malgranda domo kun verdaj fenestroŝirmiloj apud vojo en Normandio, en la centro de l'regiono de Caux.

Ĉar ili posedis antaŭ la loĝejo malgrandan ĝardenon, ili kulturadis kelkajn legomojn.

Sed jen, iun nokton oni ŝtelis de la sinjorino dekduon da bulboj.

Tuj post kiam Rozo konstatis la delikton, ŝi kuris por informi sian mastrinon, kiu malsupreniris en sia lana jupo.

Ekestis konsterniĝo kaj ĉagrenego. Oni ŝtelis, ŝtelis de s-ino Lefebre ! Oni do ŝteladas en la regiono, kaj oni eble daŭrigos.



Kaj la du afliktitaj virinoj ekzamenis la paŝosignojn, interkonjektis, supozis aferojn : « Vidu, ili pasis tie. Ili metis siajn piedojn sur la muron ; ili saltis sur la florbedon ». Kaj ili teruriĝis koncerne la estontecon. Kiel estos eble nun dormi trankvile !

La sciigo pri la ŝtelo disvastiĝis. La najbaroj alvenis, konstatis, esprimis ĉiu en sia vico sian opinion ; kaj la du virinoj klarigis al ĉiu nova alveninto sian vidpunkton kaj siajn ideojn.

Farmisto najbara donis al ili la jenan konsilon : « Vi devus havi hundon ».

La rimarkigo efektive estis saĝa ; ili devus havi hundon, eĉ se estus nur por averti pri la danĝero. Ne grandan hundon, Sinjoro ! Kion ili faru el granda hundo ! Ĝi ruinigus ilin per manĝado. Sed malgranda hundo, tute ordinaran hundeton, kiu bojetadu...

Oni ekserĉis, sed oni trovis nur grandajn, terurajn supglutemulojn. La spicisto de Rolleville posedis ja unu tre malgrandan, sed li postulis ke oni pagu por ĝi du frankojn por kovri liajn bredkostojn. S-ino Lefebre deklaris ke ŝi konsentas nutri hundon sed ke ŝi aĉetos neniun.

Nu, fine la bakisto, kiu konis la cirkonstantancojn, alportis iun matenon per sia veturilo strangan malgrandan beston, tute flavan, preskaŭ senpiedan, kun krokodila korpo, vulpa kapo kaj trumpetforma vosto simila al plumtufego kaj same granda kiel la tuta resto de la estaĵo. Kliento volis ĝin fordoni. S-ino Lefebre trovis belega tiun hundeton, kiu neniom kostis.

Rozo demandis kiel oni ĝin nomas. La bakisto respondis : « Peĉjo ».

Oni ĝin instalis en malnova sapkesto kaj unue donis al ĝi akvon por trinki. Ĝi trinkis. Post tio oni prezentis al ĝi pecon da pano. Ĝi manĝis. S-ino Lefebvre, maltrankvila, ekhavis ideon : « Kiam ĝi estos tute kutimiĝinta al la hejmo, ni lasos ĝin libera. Ĝi trovos manĝon vagante tra la regiono ».

Oni efektive lasis ĝin libera sed tio ne malpliigis ĝian malsategon. Cetere ĝi bojis nur por postuli sian manĝon ; sed tiuokaze ĝi bojis kun obstinego.

Kiu ajn povis eniri en la ĝardenon. Peĉjo ekkaresis ĉiun novan alvenanton kaj restis absolute muta.

Intertempe S-ino Lefebvre tamen fariĝis familiara al tiu besto. Ŝi eĉ havis al ĝi sufiĉan ŝaton por doni al ĝi de tempo al tempo panpecetojn trempitajn en la saŭcon de ŝia varma manĝaĵo.

Sed ŝi tute ne antaŭpensis pri la imposto, kaj kiam oni postulis de ŝi ok frankojn — ok frankojn, — ok frankojn, sinjoro ! — por tiu sensignifa hundeto, kiu eĉ ne bojetis, ŝi preskaŭ svenis pro teruriĝo.

Estis tuj decidate ke oni seniĝos je Peĉjo. Sed neniu volis ĝin havi. Ĝis dek mejloj en la ĉirkaŭaĵo ĉiuj rifuzis ĝin. Tiam, pro manko de rimedoj, oni decidis ke ĝi « piku la blankaĵojn ». « Piki la blankaĵojn », tio signifas manĝi kalkargilon. Pikas la blankaĵojn ĉiuj hundoj, je kiuj oni volas seniĝi. Meze de vasta ebenaĵo oni ekvidas specon de branĉa kabaneto aŭ pli ĝuste tre malgrandan stoplan tegmenton metitan sur la grundon. Tio estas la enirejo al la kalkargilejo. Granda puto tute rekta enprofundiĝas dudek metroj sub la tero, kaj ĝia fundo komunikigas kun serio da longaj mingalerioj...

Teruraj dramoj plenumiĝas tie en la mallumo. Kiam besto agonias jam de dek aŭ dek du tagoj en la malsupro, nutrata de l'sennomaj restoj de siaj antaŭuloj, nova besto pli granda kaj pli vigla estas subite enĵetata. Nun ili ambaŭ estas tie, solaj, malsategaj, kun lumegantaj okuloj.

Ili spionrigardas unu la alian, sin sekvas, hezitas, angorplenaj. Sed la malsato premegas ilin ; ili atakas unu la alian, dum longa tempo batalas, superenergie ; kaj la pli forta manĝas la pri malfortan, ĝin forglutas vivan.

Post kiam estis decidate ke Peĉjo « piku la blankaĵojn », oni serĉis ekzekutiston. La vojriparisto, kiu skrapis la vojon, postulis dek soldojn por la komisio. Tiu prezo ŝajnis al S-ino Lefebvre freneze altigita. La knabaĉo de la najbaro kontentiĝus je kvin soldoj ; sed tio estis ankoraŭ tro multe da mono ; fine, ĉar Rozo rimarkigis ke estas preferinde iri mem, por ke tiamaniere ĝi ne estu mistraktata dumvoje kaj ne jam konsciu pri sia sorto, estis decidate ke ili ambaŭ kuniros ĉe la noktiĝo.

Oni donis al ĝi en tiu vespero bonan supon kun peco da butero. Ĝi forglutis la manĝaĵon ĝis la lasta guto ; kaj nun, kiam ĝi movis la voston pro kontento, Rozo metis ĝin en sian antaŭtukon.

Ili iris per grandaj paŝoj tra la ebenaĵo, kvazaŭ vagabondinoj. Baldaŭ ili ekvidis la kalkargilejon kaj ĝin atingis. S-ino Lefebvre kliniĝis por aŭskulti, ĉu neniu besto ĝemas. — Ne — neniu enestas ; Peĉjo estos sola. Tiam Rozo, kiu ploris, kisis ĝin kaj ĵetis ĝin en la truon ; kaj ili ambaŭ kliniĝis kun streĉitaj oreloj. Ili aŭdis unue obtuzan bruon ; kaj jen la akran, korŝiran plendon de vundita besto, kaj poste sinsekvon da malgrandaj dolorkrioj, kaj nun malesperajn alvokojn, petegojn de hundo, kiu plorĝemas kun la kapo levita al la aperturo.

Ĝi bojetis, ho ! kiom ĝi bojetis !

Ili estis kaptataj de konsciencriproĉoj, de angoro, de freneza kaj neklarigebla timo, kaj ili forkuregis ; ĉar Rozo iris pli rapide, S-ino Lefebvre kriis : « Atendu min, Rozo, atendu min ! ».

Ilia nokto estis plena de teruraj inkuboj. S-ino Lefebvre songis, ke ŝi eksidas ĉetable por manĝi la supon, sed kiam ŝi malkovris la supujon, Peĉjon, kiu estis en ĝi, eksaltis kaj mordis ŝian nazon. Ŝi vekiĝis kaj kredis ankoraŭ aŭdi ĝin bojeti. Ŝi aŭskultis ; ŝi estis erarinta...

Ĉe la tagiĝo ŝi levis sin preskaŭ freneza kaj kuris al la kalkargilejo. Ĝi bojetis ; ĝi ankoraŭ bojetis, ĝi estis bojetinta dum la tuta nokto. Ŝi komencis plorsingulti kaj ĝin voki per mil ĉarmaj karesaj nomoj. Ĝi respondis kun ĉiuj dolĉaj nuancoj de sia hunda voĉo.

Tiam ŝi volis ĝin revidi, promesante al si mem ke ŝi faros ĝin feliĉa ĝis la morto.

Ŝi kuris al la putfaristo komisiita por eltiri la kalkargilon, kaj ŝi rakontis sian aferon. La viro unue aŭskultis silente. Post kiam ŝi finis, li diris : « Vi volas vian hundon, ĉu ne ? Kostos kvar frankojn ».

Ŝi faris eksalton ; ŝia tuta doloro subite malaperis. « Kvar frankojn ! vi mem mortus pro tia postulo ! Kvar frankojn ! » Li respondis : « Ĉu vi kredas ke mi alportos miajn ŝnurojn, miajn turnilojn kaj instalos la tuton, iros tien kun mia knabo kaj eĉ estos mordata de via malbenita hundo por la plezuro ĝin redoni al vi ? Kial do vi ĵetis ĝin ? »

Ŝi foriris indignita. — Kvar frankojn !

Tuj post la reveno hejmen, ŝi vokis Rozon kaj diris al ŝi la pretendon de la putisto. Rozo, ĉiam rezignema, ripetis : « Kvar frankoj ! tio estas ja multa mono, Sinjorino ». Kaj ŝi aldonis : « Se oni ĵetus al ĝi manĝaĵojn, por ke ĝi ne mortu tiel kompatinde ? »

S-ino Lefebvre aprobis kun ĝojo ; kaj jen ili denove forirantaj kun granda tranĉaĵo da buterumita pano. Ili ĝin rompis por fari el ĝi buŝplenojn, kiujn ili ĵetis unu post la alia, alparolante Peĉjon, ĉiu siavice. Kaj tuj, kiam la hundo estis formanĝinta pecon, ĝi bojetis por peti la sekvontan.

Ili revenis en la vespero kaj en la morgaŭo kaj ĉiutage. Tamen ili nun faris nur unu vojaĝon. Sed jen, okazis iun matenon, ke dum ili estis enĵetontaj la unuan panpecon, ili subite aŭdis fortegan bojadon en la puto. Peĉjo ne plu estis sola ! Oni estis faliginta alian hundon, grandan hundon !

Rozo kriis : « Peĉjo ! » Kaj Peĉjo bojis kaj bojis. Tiam oni komencis ĵeti la nutraĵon ; sed ĉiufoje ili klare distingis teruran kunpuŝiĝon kaj la plendantajn kriojn de Peĉjo, mordita de sia kunulo, kiu ĉion manĝis ĉar ĝi estis la pli forta.

Kiom ajn ili precizigis : « Jen, Peĉjo, estas por vi, Peĉjo ! » Peĉjo evidente kaptis nenion.

La du virinoj konsternitaj sin rigardis reciproke ; kaj S-ino Lefebvre prononcis kun akra tono : « Mi tamen ne povas nutri ĉiujn hundojn ĵetontajn en la truon. Ni devas rezigni ! »

Kaj sufokite de la penso pri ĉiuj tiuj hundoj, kiuj vivis je ŝiaj kostoj, ŝi komencis la reiron hejmen, ekmanĝante la tamen ŝparitan reston de la pano.

Rozo sekvis ŝin, viŝante siajn okulojn per angulo de sia blua antaŭtuko.

el « LA NORMANDAJ RAKONTOJ »
de Guy de Maupassant
traduko de Roland Dupuis
kun afabla permeso de la tradukinto

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO


Krucvortoj :

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	K	R	E	I	T	A	R	O	J
2	A	■	T	E	A	M	O	J	■
3	N	E	■	S	M	U	T	■	A
4	A	M	E	■	A	Z	■	A	M
5	L	E	T	E	R	I	S	T	O
6	E	R	U	D	I	■	E	O	N
7	T	I	L	■	N	I	■	L	I
8	A	T	■	I	D	E	O	■	O
9	R	■	A	D	O	L	T	O	J



NOVA PROBLEMO

Krucvortoj (proponitaj de S. Bourot)



HORIZONTALE :

1) Japana desegnaĵo (S.F.) — Trunko de vinbero.

2) Pastro de la Zoroastra religio (S.F.). — En alta grado.

3) Epoko (S.F.). — Prepozicio. — Sufikso esprimanta kolekton.

4) Devas esti klare difinita antaŭ la foriro de la eskadreto.

5) Sufikso. — Faru ion !

6) Speciala bobeno.

7) Prepozicio. — Refleksiva adjektivo. — Ĝi servas por efektivigi ion (S.F.).

8) Lirika poemo. — Persona nedifinita pronomo.

9) Elektre ŝarĝita formo de molekulo. — Tiu de la printempo estas dolĉa (S.F.).

VERTIKALE :

1) Frukto multe manĝata en Japanujo. — Ni ĉiuj estas tiuj de Adamo.

2) Nigra diamanto.

3) Sufikso. — Judgermana dialekto (S.F.). — Sufikso uzata por derivi numeralojn.

4) Ne plu eltenas.

5) Malfajna (S.F.). — Parto de ŝipo (S.F.).

6) Rilata al ia situacio.

7) Sufikso ofte uzata kun karesa senco. — Unu el ĝiaj sencnuancoj estas « persvadi ». — Konjunkcio.

8) Ŝi ne timas la danĝeron.

9) Skandinava monero. — Mediteranea frukto.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Daŭron aŭ Ripeton de ago oni esprimas :

Per Akuzativo : mi veturis du tagojn kaj unu nokton.

Per Prepozitivo (Dum, tra, en, por).

— apetito venas dum la manĝo — la koko kriis tra la tuta nokto

— mi finos la laboron en tri tagoj.

POR montras la daŭron ĉe la konsekvenco de la ago : forvojaĝi por tri semajnoj — ŝi sidiĝis por iom da tempo — foriri por ĉiam.

Per tempaj adverboj (ankoraŭ, plus, jam).


— la lampo ankoraŭ brulas ; li jam laboras ; plu lernu por la ekzameno.

AD — la pafado mortigis multajn bestojn ; la gastoj dancadis en la salono ; la knabinetoj saltadas en la korto.




Ĉu ne klare ?

— Mi ne komprenas kial vi hezitas kaj bezonas plu serĉi en la katalogo. Oni tuj konscias, ke estas virino en siaj esencaj trajtoj !



Ĉu talentulo aŭ ne ?

— Kial la tutan tagon kaj parton de la nokto, vi tiel freneze pianludas ? ĉu vere, vi ne havas radio-aparaton ?





Antaŭzorgema dommastrino

— Mendonte ĉion, kion mi deziras, mi demandas min, kiom longe vi dekalkulos tiun elspezon el mia mastruma budĝeto ; ĉu dum tiu ĉi monato aŭ laŭ du monatoj ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (3 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (430 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (4000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (25 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respond-kuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1978, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les vacances de printemps n'ont pas bien porté leur nom ; pluie, vent, froid, le printemps n'était pas au rendez-vous. Cela n'a pas empêché les nombreux participants de passer une semaine agréable et fructueuse. Quatre-vingt dix personnes, dont la moitié de moins de quinze ans, c'est un nombre rarement et peut-être jamais atteint à cette époque de l'année. Grâce aux efforts de Frédéric Le Magadure, président du G.E.E., aux jeunes écoliers français est venu s'ajouter un nombre assez important de jeunes Italiens. Cours, jeux, excursions, toutes les activités réunissaient Français et Italiens, les échanges étaient faciles. Un certain nombre d'adultes, en plus des responsables du stage, ont suivi de près et avec beaucoup d'intérêt les activités. Succès pour les responsables de ces activités. Succès de nombre également qui a obligé un groupe de Français inscrit en dernière minute de loger... à l'hôtel.

Serons-nous obligés de demander l'aide des hôteliers de Baugé cet été ? Nous n'en sommes pas encore là, mais les difficultés de logement commencent à se faire sentir, surtout pour le premier stage : seules restent des places en chambres communes. De nombreux espérantistes étrangers se sont inscrits : plus de trente à la première période.

Souhaitons que le soleil nous honore de sa présence de manière continue et vienne éclairer les nouvelles salles de cours largement ouvertes sur l'extérieur. Nul doute que dans ces salles les cours seront encore plus agréables. Venez en faire l'expérience.

P. BABIN.

Inter Ni

La printempaj ferioj ne estis vere printempaj pro la pluvo kaj la vento. Sed la naŭdek ĉeestantoj, el kiuj pli ol la duono estis malpli ol dekkvinjaraj, havis agrablan kaj interesan semajnon. Dank'al la klopodoj de la prezidanto de la Grupo de Esperantistaj Edukistoj F. Le Magadure, al la grupoj de francaj gelernantoj aldoniĝis itala grupo el la urbo Cesena. La geknaboj kune ludis, ekskursis kaj ankaŭ laboris, praktikante esperanton kompreneble. La ĉeestantaj plenkreskuloj multe interesiĝis pri la diversaj aktivaĵoj. La kastelo estis plena, tiom ke franca grupo malfrue aliĝinta devis loĝi en apuda hotelo.

Ankaŭ la someraj periodoj anonciĝas sukcesaj kun partopreno de multaj ne-francaj esperantistoj. Aliĝu frue por esti certaj, ke vi povos ĝui la plezuron... studi en la novaj klasĉambroj.

LA REVUE

Quelques retardaitaires de 1977 se sont mis en règle, mais il reste encore quelques abonnements non payés. Pouvons-nous au moins savoir si les intéressés (ou les non intéressés) désirent ne plus s'abonner ? Cela nous éviterait le tirage inutile de quelques exemplaires. Merci.

ABONEMENTS BIENFAITEURS 1977 (suite)

R. Coupeau (72)	30	J. Ménard (49)	30	E. Plutniak (62)	30
P. Jouvin (76)	30	R. Hubert (49)	30	A. Stutzmann (68)	30
A. Bongars (37)	30	R. Bastong (78)	30		
A. Walz (67)	30	B. Salmon (49)	30	**Total :**	**360**
H. Cortes (44)	30	Groupe Esp. de Tours (37)	30		

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1978 (suite)

M. Desnos (53)	30	Y. Fromentoux (35)	30	M. Colleu (92)	30
C. Cantel (17)	30	G. Ciret (49)	30	G. Gerrier (75)	30
J. Quillaud (44)	30	R. Lecoq (37)	30	A. Rannou (35)	35
J. Lezan (24)	30	B. Cheverry (49)	30	R. Riou (76)	30
G. Masse (73)	30	M. Duvigneau (45)	30	A.-M. Duqueroix (38)	30
C. Bertin (35)	30	A. Chagnoux (03)	50	C. Moreau (06)	30
J. Got (05)	30	R. Martin (35)	30	M.-T. Farjon (06)	30
R. Colney (05)	30	A. Diez (34)	30	R. Driolle (69)	30
P. Jouvin (76)	30	S. Bavay-Gilliard (59)	30	H. Mousset (75)	30
R. Buerick (62)	30	M. Bonafous (13)	30	L. Mee (Pays-Bas)	30
F. Lo Jacomo (75)	30	J. Martinez (13)	30	A. Bongars (37)	30
R. Hénaux (92)	50	C.C.E.E.A. (13)	30	A. Quillaud (76)	30
F. Bakker (Pays-Bas)	30	P. Robiolle (92)	30	R. Bruguier (30)	30
R. Slot (Pays-Bas)	30	D. Babin (44)	30	M. Tabel (63)	30
L. Gracia (66)	30	Groupe Esp. d'Aix (13)	50	A. Bois (35)	30
Groupe Esp. de Lyon (69)	30	R. Durand (88)	30	M. Diard (49)	30
M. Le Marquand (22)	30	E. Plutniak (62)	30		
M. Kerlouedan (36)	30	Y. Lucas (76)	30	**Total :**	**1 575**

NOS JOIES

Evelyne Le Magadure, fille de nos amis Simone et Frédéric Le Magadure, d'Hennebont, a épousé, en février, Hamlet Tonoïan. Nos vœux sincères et amicaux accompagnent les nouveaux époux.

Tous les amis de Grésillon seront heureux d'apprendre le mariage de Bénédicte Babin, fille de Luce et Pierre Babin, avec Philippe Mouchet. Née à Baugé, pendant un stage de Grésillon, Bénédicte a tenu à se marier à Saint-Martin-d'Arcé, tout près de la Maison Culturelle Espérantiste. Nos félicitations aux parents, et nos biens sincères vœux de bonheur aux nouveaux époux.

NOS PEINES

Nous avons appris le décès de M. Vincent, père de Janine Vincent que tous les espérantistes connaissent bien. Nous tenons à assurer Janine Vincent de notre sympathie à l'occasion de ce deuil.

Assemblée générale du 30 Avril 1978

Le 30 avril 1978, les sociétaires de la Maison Culturelle Espérantiste se sont réunis en assemblée générale ordinaire. Une liste des membres présents et représentés a été dressée et signée par les membres présents. Le nombre de membres présents et représentés est de 259 pour un capital de 67.800 F. Le quorum étant largement dépassé, la séance est ouverte à 10 heures. Mme Dairon est désignée comme présidente de séance.

RAPPORT FINANCIER

Le rapport financier est présenté par le président de la M.C.E., M. Babin, en l'absence du trésorier.

L'examen des recettes fait apparaître :

— une augmentation des recettes « séjours », due principalement à une augmentation des tarifs de pension, le nombre des séjours étant équivalent à celui de l'année précédente ;

— une augmentation des recettes « souvenirs », en raison du rajeunissement du stock des objets à vendre ;

— une augmentation des recettes « librairie », le prix de certains livres ayant augmenté dans des proportions considérables. M. Babin signale les difficultés rencontrées pour payer les livres provenant de l'étranger ;

— une augmentation des recettes « excursions » : les participants aux excursions de groupe ont été plus nombreux cette année ;

— les recettes provenant des activités culturelles équilibrent largement les dépenses ;

— l'apport financier des cours par correspondance est très réduit.

L'examen des dépenses appelle les remarques suivantes :

— On observe une diminution des dépenses alimentaires, bien que le nombre de séjours soit resté constant et

malgré l'augmentation du coût de la vie. L'achat groupé de certaines denrées, la recherche de fournisseurs donnant satisfaction sont, sans doute, les raisons principales de cette amélioration.

— L'augmentation du S.M.I.C. Il faut noter que les charges sociales représentent plus de 50 % des salaires.

— Aux frais de publicité de la M.C.E. dans les journaux espérantistes s'ajoute une participation aux frais de « Kulturaj Kajeroj », cette revue s'avérant nécessaire à la publicité de la M.C.E.

— Les frais relatifs aux activités culturelles sont réduits, mais un renouvellement du matériel devient indispensable.

Le bilan financier fait apparaître un excédent de recettes de 14.259,68 F.

RESOLUTIONS CAPITAL SOCIAL ET RESOLUTIONS DIVERSES

— L'assemblée générale enregistre le remboursement de 6 parts de sociétaires pour un capital de 600 F., correspondant au départ de 4 sociétaires.

— L'assemblée générale enregistre l'arrivée de 28 nouveaux sociétaires pour un capital de 3.400 F. 30 parts ont été souscrites par des personnes déjà sociétaires pour un capital de 3.000 F.

— L'assemblée générale enregistre que le capital social, diminuant de 600 F. et augmentant de 6.400 F., passe à 109.900 F.

— Le nombre de sociétaires est de 436. En réalité, certains sociétaires sont disparus ou décédés, et on peut estimer à 390 le nombre réel de sociétaires. Des propositions sont faites pour tenter de régler les problèmes posés lors du décès d'un sociétaire :

a) Un encart dans « Kulturaj Kajeroj » pourrait être publié pour que les sociétaires prennent des dispositions afin que leurs parts puissent être transformées.

b) Une modification des statuts pourrait être envisagée pour le cas où les héritiers sont connus.

c) Une information auprès des associations coopératives serait peut-être susceptible de nous fournir des solutions à ce problème.

— « Por la praktikantoj » a été réédité à 2.000 exemplaires. Ce livre se vend maintenant surtout à l'étranger. Le remboursement des prêts obtenus pour cette réédition sera envisagé.

L'assemblée générale adopte le rapport financier à l'unanimité.

RAPPORT D'ACTIVITE

Ce rapport est présenté par le président. M. Babin souligne que la nouvelle répartition des stages adoptée en 1977 a permis un certain rééquilibrage du nombre des participants au cours de l'été.

La participation à la première période, avec comme activité principale des conférences, a été de 100 environ.

Le nombre de participants aux deuxième et troisième périodes a augmenté, pour atteindre environ 70.

Les activités ont été les mêmes que l'an dernier : cours d'espéranto, conférences et activités diverses (reliure, vonnerie, macramé, photo, etc...).

Les passages de printemps ont été aussi nombreux que d'habitude.

M. Babin donne lecture d'une suggestion de M. Rapley afin d'améliorer le fonctionnement des cours. La discussion qui suit fait apparaître les avantages qu'il y aurait à rechercher de nouvelles méthodes d'enseignement. Il faudrait l'assistance de bons espérantistes pour l'encadrement permanent des jeunes. Mais le problème important est celui de la différence de niveau entre les participants. Le conseil d'administration est mandaté pour étudier la question afin qu'une certaine souplesse dans le programme des cours puisse être atteinte.

RENOUVELLEMENT DU CONSEIL D'ADMINISTRATION

Le renouvellement d'une moitié du conseil d'administration a lieu cette année. Les membres sortants sont MM. P. Babin, P. Chevalier, Mme B. Cheverry, MM. G. Ciret, M. Coussé, J.-P. Guillot. M. M. Coussé ne se représente pas. M. Babin rappelle que M. Coussé a travaillé pendant de nombreuses années pour la M.C.E. L'assemblée générale tient à remercier très vivement M. Coussé pour cette activité.

Outre les autres membres sortants, cinq sociétaires étaient candidats : M. D. Babin, Mlle S. Bourot, Mme G. Chaumereuil, M. E. Stuit, Mme J. Vincent. Une commission de 5 membres a été nommée pour dépouiller les votes.

Il y avait 261 votants, 4 bulletins étaient blancs ou nuls. Ont été réélus ou élus : P. Babin (254 voix), P. Chevalier (203 voix), B. Cheverry (241 voix), G. Ciret (225 voix), J.-P. Guillot (244 voix), D. Babin (191 voix). Ces personnes sont élues pour quatre ans.

QUESTIONS DIVERSES

Travaux en cours ou prévus

L'aménagement des chambres et du couloir du premier étage est terminé grâce au dévouement d'une équipe que l'assemblée générale remercie très vivement.

Les travaux pour l'installation de salles de cours sont également terminés. L'aménagement complet de ces salles de cours sera envisagé ultérieurement : installation de tables et de rétroprojecteurs.

L'achat d'un magnétoscope sera également envisagé. L'éclairage des salles de cours est à revoir.

D'autres travaux restent en attente : le couloir du deuxième étage doit être refait. Un devis a été demandé pour la peinture de l'escalier du deuxième étage. La réfection de la véranda ne peut pas être entreprise dès maintenant en raison du coût élevé des travaux à effectuer.

Il a été nécessaire de remplacer la machine à laver. Deux friteuses ont été installées.

Stages

A Pâques, le stage, dont l'encadrement a été assuré par D. et N. Babin, n'a pas posé de problèmes particuliers. Cette semaine, avec des enfants, a été un succès grâce à une participation internationale. Les adultes intéressés par la pédagogie assistaient aux leçons destinées aux enfants.

Quelques passages au printemps et à l'automne sont prévus. D'autres demandes sont en cours.

— Première période d'été : responsable, M. et Mme Babin. Des conférences seront assurées par des étrangers et par des espérantistes de la région (Balzac en Anjou, Jules Vernes, etc...). Les excursions seront organisées en fonction de ces conférences. Des cours seront assurés par Mlle Bourot et par Mme Vincent selon les demandes des participants.

— Deuxième période : responsables, M. et Mme Dairon. Les cours seront assurés par Mme Childs-Mee (1er degré), M. Lloancy (2e degré), M. Ribot (3e degré).

— Troisième période : responsables, M. et Mme Guillot. Les cours seront dirigés par M. Parisot (1er degré), M. H. Boyet (2e degré), M. Boyet (3e degré).

Au cours des trois périodes, les activités de reliure, vannerie, macramé seront proposées en fonction des possibilités. Pendant la troisième période, s'ajoutera l'activité « photo ».

A propos de cette activité « photo », M. Frangeul émet le souhait qu'un reportage photographique sur Grésillon soit réalisé pour être utilisé dans les journaux et dans les expositions à titre de publicité pour la M.C.E.

« Kulturaj Kajeroj »

Pour améliorer la revue, il semble nécessaire de diversifier les auteurs, grâce en particulier à des contacts avec les « perantoj ». Il est demandé de nouveau à ceux qui font des conférences à Grésillon d'envoyer leurs textes pour publication.

Une discussion s'est ouverte sur la façon d'améliorer l'utilisation de l'Esperanto à Grésillon. Il est apparu nécessaire de donner une importance accrue aux activités culturelles, de changer leur forme et d'en introduire de nouvelles afin d'en faire le lieu privilégié de l'utilisation de la langue.

Le secrétaire de séance,
Janette GUILLOT.

Maison Culturelle Espérantiste

PROGRAMME ÉTÉ 1978

1) **Arrivée : Lundi 3 Juillet — Départ : Samedi 22 Juillet**

PREMIERE PERIODE

CONFERENCES - DISCUSSIONS - ACTIVITES MANUELLES - EXCURSIONS
SOIREES RECREATIVES - COURS DE PRATIQUE

2) **Arrivée : Dimanche 23 juillet — Départ : Samedi 12 Août**

DEUXIEME PERIODE

COURS DES 3 DEGRES - ACTIVITES MANUELLES
EXCURSIONS - SOIREES RECREATIVES

3) **Arrivée : Dimanche 13 Août — Départ : Samedi 2 Septembre**

TROISIEME PERIODE

PROGRAMME IDENTIQUE A CELUI DE LA DEUXIEME PERIODE

Retenez vos chambres à l'avance

Renseignements et inscriptions :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
CHATEAU DE GRESILLON - 49150 BAUGE